# Informilo

Monata revuo de la estraro de FEL - 11a j. n-ro 5, sep. 1991

## Estraro

*Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69..

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

14a de septembro 1991

## 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

### 1.1 Buĝetkontrolo

La membroj de la komisiono kontrolis la spezokonton sed ne renkontis gravajn deviojn kompare al la pasintaj jaroj. La tuta spezaro ŝajnas pli pozitiva ol en 1990. Ili konstatis ke ĉefe la debetaj internaj kontoj kreskas super la buĝetita sumo. PP klarigas ke ekde januaro ni librotenas ne nur la salajrokostojn de ĉiu unuopa laboro, sed ankaŭ parton de la fiksaj kostoj, kiel luo, varmigo, elektro ktp. La komisiono rekomendas daŭre libroteni tiel, eĉ se per tio la buĝeto de la internaj kontoj estus superita.

### 1.2 Investoj

La aĉeto de nova komputilo ne jam okazis. Unue oni devos jen kaj jen adapti la fontversiojn de la programoj, tiel ke tiuj ĉi povu funkcii sub nova versio de la operacia sistemo Unix. Nia programisto Fred de Geus povos efektivigi tion nur en la lastaj monatoj de 1991.

JV sugestis ke oni petu ankaŭ helpon de Albert Claesen ĉi-rilate.

### 1.3 Eldona agado

Estas presita *Meznokto metropolitena* de Krys Ungar kaj prespreta *Sub influo de alkoholo* de J.H. Sullivan. La unua aperos kiel verko 14 en la





Stafeto-serio septembron, la novelaro de Sullivan iam aŭtune.

Finkompostita estas *Ŝirpecoj* de Christian Declerck kaj kompostata la nova Esperanto-gramatiko.

*Renardo la Vulpo* kaj *La komencanto* ambaŭ daŭre kuŝas en la tirkesto de Petro de Smedt.

La historian libron revizios Marko Fettes. Li promesis fari tion ankoraŭ ĉi-jare.

Baldaŭ povos aperi la Esperanto-dokumento *Naar één taal voor Europa?* kiun tradukis Verloren van Themaat kaj kompostis Jean Pierre Allewaert.

ID proponas ke la centro ellaboru novan faldfolion kiu varbas por nia libroklubo *Stafeto*.

Venis propono por eldoni libron de Edwin de Cock kaj de iu Ĉino. La komisiono nun esploras.

### 1.4 Halbart

Neniuj novaĵoj.

## 2 Administra parto

Ĉeestas: La samaj tri plus Alex Humet, Jean Pierre Allewaert, Jos Vandebergh kaj Peter Berx.

### 2.1 Antaŭaj protokoloj

Neniuj rimarkoj.

### 2.2 *Monato*

PP informas, ke Stefan Maul eksiĝis kiel ĉefredaktoro de *Monato*. La lasta numero sub lia respondeco estos la decembra de 1991. Post tiu dato transprenos la laboron skipo de dudeko da homoj, inter kiuj Krys Ungar, William Auld, Andy Künzli, Seán Osborne, Roland Rotsaert kaj multaj aliaj. La teknikan redaktadon transprenos la oficejo.

JV demandas kial FEL fakte eldonas *Monaton* kaj *Horizon-taal*. Ĉu FEL havas iun eldonpolitikon? ID proponas prokrasti tiun ĉi punkton ĝis la oktobra kunsido.

### 2.3 Kampanjo *Horizon-taal*

AH raportas ke li ne sukcesis trovi kunlaborantojn por tri el la universitataj urboj: Leuven, Gent, Antwerpen. Hasselt jam faris ĉiujn necesajn preparlaborojn kaj baldaŭ mendos la afiŝojn kaj la flugfoliojn. Kortrijk faros kampanjon, sed ekster la kadro. Ilia kampanjo ne direktiĝas precipe al studentoj kaj uzos ankaŭ aliajn varbilojn. AH petos al Pieter Vets ĉu li pretas gvidi la kampanjon en Antwerpen. La informa fondaĵo de Antverpeno povos helpi lin.

### 2.4 Kolizioj

En la semajnfino de la 5a kaj 6a de oktobro, kolizios tri grandaj eventoj: Trilanda renkontiĝo, Ĉinio aktive kaj la libroborso "Het andere boek". La estraro esploras kiel sendi reprezentantojn al ĉiuj tri manifestacioj, sed ne sukcesas trovi kandidatojn por "Het andere boek" en sabato la 5a. Ĉiu serĉu laŭ siaj eblecoj personon kiu povas deĵori kaj doni informojn pri Esperanto.

### 2.5 Kunlaboro kun Nederlando

ECN informpetis, ĉu FEL kune kun Nederlando pretus eldoni faldfoliojn kaj broŝurojn. La estraro klarigas ke FEL elspezis grandajn sumojn por krei modernan kaj efikan triŝtupan informilaron antaŭ kelkaj jaroj. Ne havas sencon nun transpreni novajn faldfoliojn. Nederlando povas kontraŭ kostoprezo aĉeti niajn, ankaŭ kun siaj nomo kaj adreso, se ili tion deziras.

### 2.6 Nova Esperanto-dokumento

Edward Symoens proponis eldoni novan Nederlandlingvan Esperanto-dokumenton. ID jam legis ĝin. Ni atendu la opinion de la aliaj estraranoj.

### 2.7 Venontaj estrarkunsidoj

Eksperimente la venonta kunsido okazos vendredon la 11an de oktobro. La financa komisiono kunsidos de la 17a ĝis la 18a h. 30. Plenkunsido okazos ekde la 18a h. 30. Ni invitu Gerd Jacques al la financa komisiono.



La novembra kunsido okazos sabaton la 16an, la decembra sabaton la 7an.

### 2.8 ILEI-ekzamenoj

Laŭ peto de ILEI FEL organizos la 19an de oktobro unuagradajn kaj duagradajn Esperanto-ekzamenojn. Personoj kiuj interesiĝas pri tiuj ekzamenoj, prefere aĉetu por prepari sin la libreton "Internaciaj ekzamenoj" ĉe FEL aŭ ĉe sia loka libroservo. Ili enskribiĝu por la ekzamenoj pagante 800 fr. antaŭ la 28a de septembro, aŭ 900 fr. antaŭ la 12a de oktobro, al konto 961-1907450-37 de ILEI sekretaria servo, Dilbeek.

### 2.9 Sinteno al aktualaj problemoj

FEL ricevis helpopetojn el Jugoslavio (demandanta intervenon je politika nivelo) kaj el Ĉinio (demandanta monon, nutraĵojn, medikamentojn ktp.). Pri Ĉinio ID jam kontaktis la organizaĵon *Artsen zonder grenzen*. Pri Jugoslavio ekestas diskuto, kiu rezultas en jam antaŭa decido. FEL povas kaj pretas informi sian membraron kaj pere de la gazetaro la publikon ĝenerale pri missituacioj. La telefaksaĵo el Jugoslavio tamen enhavis neniujn novaĵojn pri kiuj la gazetaro povus interesiĝi.

### 2.10 Diversaĵoj

#### 2.10.1 NBN

La asocio Nova Biologia Nomenklaturo iĝos 20jara. FEL estos reprezentata kaj transdonos malgrandan donacon.

#### 2.10.2 Eŭropa Esperanto-Kongreso en Verona

FEL informos siajn membrojn sed ne organizos karavanon.

#### 2.10.3 Revuo *Horizon-taal*

JV petas ke estonte la titoloj en *Horizon-taal* estu pli okulfrapaj. Krome sur p. 2 estu iu indiko ke temas pri revuo pri Esperanto. Nun la legantoj vane serĉas pri kio ĝi temas. AH sugestas ke la "*zicht*-titoloj" havu iun klarigon.

### 2.10.4 Limburga tago

La venonta Limburga tago okazos la 22an de aŭgusto 1992 en Hasselt.

Protokolis PP.

Ĝenerala membrokunveno de FLEJA je dimanĉo 30a de junio 1991 dum la somera FLEJA-semajnfino en Eeklo.

Ĉeestantoj: An Alberto, Peter Ameye, Hilde De Meyere, Patrick Haerick, Lydia Kerremans, Rob Lemeire, Willem Rasschaert, André Ruysschaert, Wim Slootmans, Eddy Van den Bosch kaj Jan Vanuytven.

Senkulpiĝon petis: Stefaan Cottenier kaj Pieter Vets.

TAGORDO

1. Enkonduko :
Protokolanto : André Ruysschaert

André bonvenigas la ĉeestantojn. Li prezentas la ĝisnunajn estraranojn kaj klarigas la celon de ĉi tiu kunveno: car la marta kunveno ne povis okazi ni devas ĉi tie priparoli la agadon de FLEJA kaj elekti novan estraron.

2. Agado :
2.1 FLEJA (kun)eldonas la revuojn JEN kaj KONCIZE, sub redakto de Stefaan Cottenier.

2.2. La ĉeestantoj kontentas pri ĉi tiu unua somera semajnfino de FLEJA. Ili trovas bona la ideon venontjare refoje organizi renkontiĝon en la sama ejo, sed la dato ŝanĝiĝu, prefere al la lasta semajnfino de aŭgusto. Pluraj homoj anoncas sin pretaj kunlabori. Post diskuto Willem akceptas iĝi ĉefrespondeculo pri la organizado (li cetere intencas transpreni la organizadon de la skisemajnfino de Marie Grela, se tiu ne plu mem organizus. sed tio okazas ekster la kadro de FLEJA).

3. Estraraj elektoj :
André dankas la eksiĝantajn estraranojn pro la laboro kiun ili dum pluraj jaroj faris.
An, André kaj Eddy pretas resti estraranoj. Krome jam kandidatiĝis Pieter kaj Stefaan. Anoncas sin ankaŭ Jan kaj Rob. Laŭ unuanima decido de la ĉeestantoj tiuj 7 homoj formos la novan estraron. Unua kunveno de la nova teamo. al kiu ĉiuj membroj bonvenas. okazos en oktobro (detaloj sekvos).